



MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 7-8

Julio - Aŭgusto 2023 Kol. 458/39

XX

Enhavo: E-tago en Ŝumperk Ŝip-lifto PEKO E-tago en Krakovo
UK 2024 E-klubo Pardubice Forpasis G. Grattapaglia

XX

E-tago en Ŝumperk

Kiel ĉiujare, en Ŝumperk en majo okazis E-tago. Ĉi-jare estis 28 partoprenantoj el la tuta respubliko. Unue ni promenis tra parko-areo en la urbo kaj poste ni vizitis la novan fajrostacion de la urba fajrobrigado. Ĝia komandanto prezentis al ni la tutan areon. Ni vidis modernan ekipaĵon, ni eĉ provis "veturigi" agopretan



veturilon (kompreneble ne por aktuala urĝa bezono). Ni enrigardis en la kuirejon kaj litoĉambrojn, trapasis garaĝojn kaj la sportejon. Ni alte aprezis la gvidsistemon, kiu koncernas la

efikan funkcion de urĝ-raport-intervenoj. Ni eksciis multajn interesajn aferojn el la vivo de fajrobrigadistoj. Poste ni iris al la trinkejo U medvídka (Ĉe urseto), kie ni tagmanĝis kaj ni sciigis nin reciproke pri niaj klubaj aferoj, kaj ni ricevis inviton al la E-konferenco, kiu okazos de la 28-a de septembro ĝis la 1-a de oktobro 2023 en Prudká u Tišnova. La turismemulojn allogas vizito de la burgo Pernštejn, kiu estas unu el la plej gravaj kaj belaj nobel-sidejoj en Moravio.



Nia renkontiĝo finiĝis danc-ĝue kaj tombolo-gajige (kaj gajnige), ĉe la muzikakompano de la "Standa-grupo", kiel kutime. Ĉiuj ŝatis la viziton al Šumperk kaj ni jam antaŭĝojas la venontjaran renkontiĝon en tiu urbo.

S. Nováková kaj M. Turková

Ŝipa lifto en Strépy-Thieu



En la suda Belgio la Centra kanalo (Canal du Centre) tie ĉi kunligas la riveron Escaut/Schelde (Skaldo) kun la kanalo Charleroi-Bruxelless /Brussel. La Centra kanalo estas fama ĉefe danke al la ŝip-lifto, kiu siatempe estis la plej granda en la mondo

kaj ĝis nun ĝi restas la dua. Ĝi troviĝas en Strépy-Thieu. De la

ekfunkciado (2002) kreskis la trafiko sur ĝi de 30 000 toneloj monate al 300 000 toneloj monate. Unu barĝo da 1350 tonelaj egalas al ĉirkaŭ 90 kamionoj. La niveldiferenco estas 73,15 m kaj ĝiaj du ŝipkuvegoj estas kapablaj levi pli pezajn kaj grandajn navigilojn ol estis kapablaj kvar ŝipaj liftoj, kiuj troviĝas nun jam kiel historia parto de la Centra kanalo. La akva konekto tre helpas al aŭtovojoj, kie sekve danke al ŝipa navigado trafikas malpli da kamionoj. La ŝiplifton oni povas viziti kaj vidi kiel ĝi laboras. En la muzeo, kiu estas ĉi tie, oni bildigas la konstruadon kaj funkciadon de la lifto, historion de la rivera navigado kaj la tutan kanalo-reton en Belgio. La nova parto de la kanalo tre mallongigis ankaŭ la tempon de navigado. En Belgio rivera navigado estas tre grava parto de trafiksystemo.



La Malnova parto de la Centra kanalo, kiu estis finkonstruita en la jaro 1917, ne estis forlasita, ĝi estas nun uzata ĉefe por turismoŝipoj, sed oni povas vidi tie ankaŭ ŝarĝoŝipojn. Kompare al la nova kanalo estas la malnova pli trankvila, pli natura kaj pli bela. Dum la navigado oni povas vidi diversajn interesaĵojn, kiel kluzojn, ŝipliftojn, pontojn, kiujn deĵorantoj devas levigi aŭ turnigi kaj tio ĉio funkcias meĥanike. Oni devas admiri spriton kaj lertecon de konstruantoj.

Vizito de la ŝipa lifto, muzeo kaj navigado estas tute senbariera kaj taŭga por handikapuloj.

Lád'a Hakl

PEKO – Printempa Esperanto-Kunveno

18. - 21. majo 2023

PEKO estas Printempa-Esperanto-Kunveno, sed jam de kelkaj jaroj ĝi fariĝis kvazaŭ belga kongreso. Ĉi-foje oni festis la jubilean dek-jariĝon de "Verdaj Skoltoj", kiuj organizis la aranĝon en la urbeto *Tilff* sub la gvido de Valère Doumont, nomata Lupo. La organiza teamo konsistis el dek skoltestroj kaj aliaj skoltoj inter kiuj estis dek ses adoleskantoj kaj ok junuloj. Estis akceptitaj tri novaj skoltoj al kiuj oni transdonis nigroverdan koltukon. La skoltoj havas kromnomon, tiel aperis inter ni Abelo, Bizono, Briardo, Dingo, Korsako, Magoto, Mambao, Orcino, Neĝpantero.

Tilff estas urbeto proksima al la urbo Lieĝo. Ĝi situas en profunda valo de la rivero *Outhre* ĉirkaŭata de bela naturo kaj de arbaroj por agrablaj promenadoj. La urbeto famiĝis pro sia speciala karnavalo en kiu paradas "Poreuloj" - homoj trikolore vestitaj per longaj verdaj ĉapoj kun sonoriloj, blankaj ĉemizoj kaj pantalonoj, kaj ĉe la piedoj pajlo ĉirkaŭas la krurojn kvazaŭ radikojn. Gigantoj akompanas la grupon. En la urbeto staras fontano kun kolono ornamita per poreuloj.

Pekon partoprenis ĉefe junaj homoj el Belgio, Germanio kaj Francio. Entute kvindek geesperantistoj festis la dekjariĝon. Lu Wang alvenigis sep ĉinajn gejunulojn loĝantajn en Germanio same kiel ŝi. Ili ĉeestis Esperanto-kurson por komencantoj, kiun gvidis Christine Brücker laŭ diversaj instrumentoj.

Ni loĝis en renovigita farmbieno de la kastelo *Brusonde* el la 18-a jarcento, adaptita por diversaj kulturaj okazaĵoj. Apuda lago kun ĉisezone florantaj iridoj ĉe la rando kaj nimfeoj en ĝi, ornamas la parkon kaj donas belan vidon al la kastelo. Apud la loĝejo en antaŭa garbejo troviĝas unika muzeo pri abeloj. Ĝi prezentas filmojn pri la vivo de abeloj, posedas riĉan kolekton

de abelbredaj objektoj el diversaj epokoj kaj amason da belgaj kaj eksterlandaj abelujoj skulptitaj el trunkoj. En la muzeo estas instalitaj ankaŭ du vitraj abeluloj por ebligi spekton de la agado de la abeloj. La muzeo estis inaŭgurita en la jaro 1974-a.

Dum la evento okazis diversaj programeroj. Bernard Regis prelegis kaj prezentis diversajn mapojn. Skoltoj priskribis la historion de la skoltismo, parolis pri siaj agadoj, aktivadoj, distraĵoj kaj aventuroj kiujn ni povis spekti ankaŭ bilde. Ili rakontis pri diversaj grupoj, laboraj kunvenoj, semajnfinoj kaj tendumadoj. Ni eksciis multon pri skoltismo - pri la tutmonda movado, pri ĵamboreoj, totemoj, diversaj insignoj kaj simboloj. Ili konigis al ni la skoltajn leĝon kaj promeson kaj informis ankaŭ pri vojaĝkonkurso kaj muzikalo dum la IJK. La himno de la Verdaj Skoltoj estas: "La aŭto de la ĉef'..." Ili kunvenis krom en Belgio ankaŭ en Francio, Germanio, Hispanio kaj Nederlando. En la ĵaŭda vespero Ideal Gabalda organizis cirklodancadon. Ĉiuj fervore sekvis la instrukciojn kaj bone amuziĝis.

Dum la tago la partoprenantoj distriĝis per diversaj ludoj, kunkantis, provis muziki per tubetoj, konstruis simplajn aŭ pli komplikajn objektojn per lignaj bastonetoj, branĉetoj, tolaĵoj, papero kaj ŝnuretoj, faris origamion, ŝtofcolorigis ĉemizojn aŭ sakojn. Okazis ankaŭ gustumado de bieroj, kaj vespere eblis spekti filmojn aŭ ĉeesti noktan ekskurson. Por la posttagmezoj estis organizitaj ekskursoj - vizito al la urbo Lieĝo kaj kajakado sur la rivero *Outhre*, kie kelkaj spertis banadon ĉe renversiĝo de la kajako. Iuj piedpromenis ĝis la abatejo *Brialmont*. Sur la ludtereno de la bieno aperis ankaŭ alia skolta grupo.

Ni manĝis precipe vegetare, kelkaj vegane. Bongustajn pladojn kuiris por ni Ella Strug kaj Eddy Van den Bosch kun la helpo de skoltoj en la kuirejo. Ni havis okazon gustumi ankaŭ

ĉinan manĝaĵon (farĉitan pastaĵon) pretigitan de ĉinaj gastoj kaj anas-ovojn, kiujn provizis Valère. Ne mankis ankaŭ frititaj bananoj kun fandita ĉokolado, specialaĵo de Verdaj Skoltoj. Ĉi-foje ili ne estis rostitaj rekte super fajro kiel oni kutimas fari en



la naturo, sed bakitaj en la forno.

Antaŭ la dimanĉa forveturo estis anoncita la premio de la "Granda ludo". La gajnintoj ricevis jubilean bele ornamitan botelon, kiun eblis ankaŭ aĉeti por subteni la skoltan movadon.

Bone funkciis la libroservo de Fel. Esperantistoj el Lieĝo eldonis dulingvan libreton pri *Tilff* en Esperanto kaj la franca lingvoj. En la lasta vespero prezentiĝis la orkestro de tubistoj kaj la skeĉo pri "Kion diras vulpo?". Poste ni

ĝuis koncerton de Jonny M sekvatan de diskomuziko. Ĉiuj bone amuziĝis ĝis malfruaj horoj. Estis agrabla etoso inter junaj skoltoj. Dankon al la organizantoj.

Liba Gabalda

E-tago en Krakovo

La 34-a Esperanto-Tago okazis en Krakovo, Pollando, de la 2-a ĝis la 4-a de junio 2023. Kunvenis 31 esperantistoj el 4 landoj: Pollando, Slovakio, Ĉeĥio kaj Ukrainio.

Mi alvenis al Krakovo kun Anja Gybasová kaj Fejfi jam ĵaŭde vespere. Ĉar la programo komenciĝis ĝis vendrede je la 11-a,



ni havis almenaŭ du horojn por ekkoni la urboparton - Podgórska. Sur la placo "Rynek Podgórski" ni vidis grandan kaj belan templon de Sankta Jozefo. Interne, krom la ĉefnavo kun pseŭdogotika altaro prezentanta Jozefon kaj Jesuon Kriston, estis du flankaj navoj kun belaj altaroj. Interesa estis ankaŭ la



pentraĵo de la "Nigra Madono" sur unu el ili. Kiam ni foriris, ni eksciis, ke eĉ la eklezio "iras laŭ la tempo". Malantaŭ la lasta benko estis vendotablo kun panelo por elektronika pago de kontribuoj en pluraj prezoj de pln 2 ĝis pln 100, kaj pago estas akceptata de pluraj specoj de bankkarto.

Jes, ankaŭ la preĝejo modernigās. Ni spertis alian

surprizon, kiam ni scivoleme rigardis eksteren dekstren de la templo. Post kelkaj paŝoj malfermiĝis antaŭ ni malgranda sed mirinda malstreĉiga aŭ medita ĝardeno, plena de metalaj statuoj, skulptaĵoj, benkoj kaj brakseĝoj por ripozi. Super la ĝardeno oni vidas la renovigitan parkon de W. Bednarski kaj la templo en sia tuta gloro. Ni ne emis la lokon forlasi, sed la programo ne atendis.



Post la bonvenigo, Marta Michalowska legis al ni kelkajn ŝercojn en Esperanto kaj en la pola.



Post tio, Adam Wilkus faris tre interesan prelegon pri birdoj en la suda parto de Pollando, dum kiu ni vidis belajn fotojn kaj aŭdis eĉ sonojn de la birdaro. Je la fino, li organizis konkurson por distingi la birdojn, iliajn specifajn trajtojn kaj karakterizaĵojn kaj ni divenis, al kiaj "vortoj" similas ilia kantado.

Krome, Lidya Ligenza konigis al ni la librojn de Wislawa Szymborská, pola

poetino, humanistino, tradukistino de franca literaturo, kiu estis la unua pola virino, kiu gajnis la Nobel-premion pri literaturo en 1996. Ŝi mortis en Krakovo la 1-an de februaro 2012.

Eĉ antaŭ la promenado tra la restaŭrita parko kaj antaŭ la tagmanĝo ni trapasis la prelegon de Andrzej Sochacki pri kuracplantoj kun ties bildoj kaj gustumado, ankoraŭ longe post tio li estis ĉirkaŭita de gustumantoj kaj volonte respondis iliajn demandojn.

Post la tagmanĝo, Pavol Petrik konigis al ni la novajn projektojn de la internacia organizo EDUKADO ĉe interreto (E@I).

Magdalena Tatara montris al ni plurajn retejojn, kie oni povas krei lingvajn kvizojn kaj testojn por lerni Esperanton en amuza maniero. Ni praktike provis kelkajn el ili. Marta Majerczak kaj ni analizis 3 satirajn poemojn de diversaj Esperantistaj aŭtoroj. Poste, ni provis diveni la nomojn de la poemoj kaj de iliaj aŭtoroj en la kvizo.





Pere de vida prezentado Halina Radota konigis al ni la ĉi-jaran fervojan kongreson, kiu okazis en Antverpeno, Belgio. La fino de la vespero apartenis al Mikael Linecki kaj Tatjana Kolomijec, kiuj kantis ukrainajn popol-

kantojn en Esperanto.

Sabato komenciĝis per bonega prelego kun ilustraj ekzemploj de la juna studento Tymoteusz Smolinski. Li klarigis al ni, kio fizike kaj kemie okazas en taso aŭ glaso da teo.

En nekutima maniero Ewa Caban konigis nin kun la evoluo de la arkitekturo de altaj konstruaĵoj – komparante la konstruadon de la Babilon-turo al nuntempaj altkonstruaĵoj - en la mondo kaj en Pollando.

Roman Schodnicki parolis pri mielo, abeloj, ilia vivo kaj iliaj diversaj produktoj kaj ilustris ilin per bildoj. Fine, li preparis kvizon por ni kaj rekompencis la ĝustajn respondojn per botelo da mielo kaj mielbalzamo.

Okaze de la jubilea 550-a naskiĝdatreveno de la astronomo Nikolao Koperniko, Krystyna Zgud rakontis pri lia vivo kaj laboro. Irek Bobrzak konigis al ni interesajn faktojn pri la nomenklaturado de plantoj. Ni eksciis pri la laboro de grupo, kiu kreas vortaron de plantoj en Interreto en la gamo de ĉirkaŭ 16 000 eroj ĝis nun.

La meso okazis en Esperanto en la kapelo apud la Preĝejo Sankta Jozefo. Roman Gmyrek celebris ĝin.

Wolodzimierz Opoka avertis nin en sia tre interesa prelego pri drogtrompantoj, ke kiam ni aĉetas kuracilojn per Interreto, ni



kutime ricevas neefikajn falsaĵojn, kiuj povas esti tre danĝeraj por nia sano.

Robert Kamiński montris per fotoj, ke en multaj ŝtatoj en la mondo kaj en ties urboj troviĝas stratoj, kiuj estas nomitaj laŭ L. L. Zamenhof.

Konklude, mi konstatas, ke la programo estis plena de prelegoj, kiuj estis interesaj ne nur por mi, kaj mi dankas la aŭtorojn pro ilia laboro.

Eva Pazourková, tradukis L. Srbová

Universala Kongreso en Aruŝo, Tanzanio, en 2024

Por la 109-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), okazonta en 2024, la Estraro de UEA unuanime elektis Tanzanion kiel kongreslandon. La unuan fojon UK okazos en la kontinento Afriko. La gastiga urbo, Aruŝo, estas internacia turisma destino, sed ne nur: ĝi ankaŭ estas grava diplomacia urbo, la sidejo de la Orient-Afrika Komunumo kaj de la Afrika Kortumo de Afrika Unio.

La regiono de Aruŝo loĝigas pli ol 2 milionojn da homoj. Ĝi troviĝas je la orienta branĉo de la Granda Rift-Valo, sub modera klimato. La grandurbo estas proksima al la Nacia Parko Serengeti, la Konservada Areo Ngorongoro, la Nacia Parko Lago Manyara, la Gorĝo Olduvai, la Nacia Parko Tarangire, la Monto Kilimanĝaro kaj la Monto Meru en la Nacia Parko Aruŝo mem.

La Esperanto Asocio de Tanzanio (EATA) invitis kongresi en Aruŝo post multjara laboro de la Afrika Komisiono de UEA, kiu plenumis la taskon kunordigi la landajn asociojn en la kontinento por difini la invitanton de la unua UK en Afriko. La kunlaboro estis multthoma kaj internacia. Per tiu decido ankaŭ la Estraro de UEA plenumas devon de la Asocio, kiu en la pasinta

jardeko deklaris la okazigon de UK en Afriko kiel strategian elementon por UEA.

La Asocio nun kunlaboros kun la lokaj aktivuloj por fiksi la datojn, lokan kongresan komitaton, temon kaj aliajn detalojn de la 109-a UK. La kongresejo estos la Aruŝa Internacia Kunveneja Centro, altnivela loko por internaciaj eventoj, kiu jam gastigis eventojn de UN. La Kongresa Fako kaj la Estraro de UEA ankaŭ kunlaboros kun ĉiuj partioj koncernataj de la okazigo de la UK, ĉu de la Esperanto-movado, ĉu de lokaj instancoj en Tanzanio. Jam eblas subteni la 109-an UK-on per donaco al la Fondaĵo Afriko de UEA: uea.org/alighoj/donacoj/afriko.

El E-klubo Pardubice

En nia malgranda E-grupo ni festis gravan naskiĝtagon de nia amiko Inĝ. Josef Hron, kiu estas delonga membro de AEH.



Multaj konas lin kiel la aŭtoron de la interreta vortaro Ĉeĥa-Esperanta, Esperanta-Ĉeĥa, kiu jam enhavas pli ol 330 mil E-vortojn. Li ankaŭ tradukadis artikolojn kaj korektadis niajn erarojn dum niaj E-renkontiĝoj.

Ni deziras al li bonan sanon, feliĉon kaj kontentecon por multaj pliaj jaroj.

FORPASIS GIUSEPPE GRATTAPAGLIA

La brazila kaj tutmonda Esperantista komunumo funebras. Forpasis je la 11-a de junio unu el la elstaruloj en la movado por la Internacia Lingvo. Giuseppe Grattapaglia, laŭ sia naskiĝo estis italo, en sia lando inĝeniero, kaj migris al Brazilo kun sia edzino kaj filoj, meze de la jaroj post 1960. La familio fiksiĝis en la Ŝtato Goiás, kie instaligis la legendeca “Bona Espero”, bieno-lernejo, kiu estis mejloŝtono en la municipo Alto Paraíso. Tie ili laboris kaj akceptis la viziton de esperantistoj el la tuta mondo, kiuj atestis ilian eksterordinaran agadon favore al infanoj, por la naturmedio kaj por la rajto je civitaneco. Kune kun sia edzino, Úrsula Grattapaglia, Giuseppe konservis krome intensan internacian aktivadon favore al Esperanto. Esperanto perdis grandan humaniston.

Sendis al ni Liette Lêla el Brazilo

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. +420 721 537 970
e-mail: ahh@esperanto-ahh.eu interreto: www.esperanto-ahh.eu
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka, číslo účtu AEH 2801322017, kód banky 2010
IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.